DIGEST AND REVIEW, popular digest magazine, announces (in Aug. issue) a series of Esperanto articles and lessons. An introductory article appears in Sept., a Practical Esperanto Course in Oct., Nov., Dec., Jan.

LETERO DE JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Karaj samideanoj,

Ni estas emociitaj de tio, ke oni havigis al ni okazon tiel frue saluti vin, Usonaj samideanoj, en la nomo de la Japana Esperantistaro. Ĉi tiun plezuron ni dankas al nia servema amiko en la Usona mararmeo, Leŭtenanto S. E. Martin, ĉarma juna oficiro, kiu al nia multa bedaŭro forlasos nin hejmen jam en la kuranta semajno, kaj por kies honoro ni donas hodiaŭ kunvenon kun la ĉeesto de ĉ. 50 Tokiaj esperantistoj en nia domo — en nia propra domo, kiu kvazaŭ per miraklo restas sendifekta trans realajn danĝerojn plurfojn.

Ne nur la domo, sed ankaŭ nia organizo mem restis sekura ankaŭ dum la tuta daŭro de la milito malgraŭ diversaj malfaciloj, precipe furiozo de ŝovinistoj, kaj jam en la unua tago de la postmilita rekonstruado ni povis fari viglan ekpaŝon por nia afero.

La 16-an de decembro ni havis nian 32-an Kongreson kun 71 ĉeestantoj kaj faris tre viglajn diskutojn pri la direkto de nia postmilita movado. La adresoj de la plejmulte da membroj estis perditaj en la lasta unu jaro de la milito pro la ruiniĝo de la urboj, sed ĝis hodiaŭ ni sukcesis jam kontakti kun pli ol 1,200 membroj. Kaj ĉi tiu cifero kreskadas tagon post tago. Esperantaj kursoj estas organizitaj en multaj kolegioj kaj universitatoj kun la partopreno de 50 ĝis 200 studentoj respektive. Multaj distingitaj natursciencistoj venadas al ni por nove lerni Esperanton kun la deziro publikigi al la mondo siajn laborojn estonte en nia lingvo. Unuvorte nia movado ĉi tie montriĝas multe-promesa.

Al ni ankoraŭ ne estas permesite publike korespondi kun alilandaj kolegoj, kaj tial ni dubas, ĉu ni trovos tre baldaŭ ŝancon skribi al vi la duan fojon. Se vi do havos neniun informon pri ni por longa tempo, vi tamen ne estos perfiditaj, ni kredas, supozante, ke ni estas laborantaj por nia komuna intereso energie kaj sukcese.

Kiam ni, japanoj, estos permesitaj en dezirinde proksima estonto partopreni en la internacia vivo, ni, esperantistoj, klopodos sindoneme en la entrepreno de la venigo de la konstanta mondpaco. Kaj en tiu ĉi laboro ludos, ni kredas, gravan rolon interhelpe de vi, Usonaj esperantistoj, kaj ni, japanaj. Krome ni atendas de vi helpon al nia tasko klerigi per nia aktiveco nian popolon. Vi certe ne ŝparos ĝin.

Intertempe transdonu, ni petas, karaj kolegoj, nian bondeziron al la samideanoj de via lando, kaj se ni ne trouzos vian helpemon, ankaŭ al la tutmonda esperantistaro. Esperante, ke ni tre baldaŭ rehavos feliĉon partopreni en la internacia kunlaboro, ni restas sincere viaj.

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Subskribis: S. Satojori, T. Horumi, J. Taraŭa, M. Sudori, Wada-Mikiko, Tsoda-K., Gumpej Fuke, M. Horiuĉi, H. Nakajima, Kitabara-ŝiro, Sadamoto Jamada, Kijosi Mituisi, Jagi-Nibej, Higa-Sbunsho, Yamada-Acuŝi, Joŝio Niŝikaiŭa, Macutaro Sakej, Fumio Akita, Nara Jeje, Tomimori-Gentaro, Joŝiaki Miŭa, Mijake-ŝike, H. Kuraĉi, K. Isido, Manzaŭa-Maki, Torao Sŭakuma, T. Nakajama, Tabata-Kisaku, Aoŝima-Tomoĵi, Aoŝima-Josio, Arata Macuno, Motohazu Takubuko, Cukihora-Juzuru, Adaĉi-Ĉotaro, Riej Hasegaŭa, Masuzo Inoue, T. Ishikaŭa, H. Nakamuro, T. Ŝimazui, M. Sugimoto, Nakagaki-Koĝiro, Emori-Minosuke, Obaŝi-Rjutaro, Takagi-Teiŭi, Tadaŝi Urato, S. Murajama, Koŝi Ozako.

LA JAPANA ESPERANTO-MOVADO VIVAS

Pere de *Amerika Esperantisto*, la japanaj samideanoj salutas "en la unua tago de la nova epoko al la transmaraj kolegoj".

Kun plezuro ni eksciis, ke la Japana Esperanto-Instituto, ĉefa organizo Esperantista en Japanujo, bone travivis la militon kaj ke ĝi organizis la 32-an Japanan Esperanto-Kongreson en Tokio la 16-an de Decembro 1945. *Amerika Esperantisto* jam ricevis tri numerojn de la reaperanta gazeto *La Revuo Orienta* kun interesa enhavo. La decembra numero eĉ publikigis anglalingvan tradukon de artikolo "Neceso kaj eblo de lingvo internacia," eltirata el la konata Unuel-broŝuro de D-ro Zamenhof. Presita kun paralela teksto en Esperanto, la artikolo estis uzata por propagando inter usonaj soldatoj en Japanujo. Jen la unua artikolo (iom mallongigita) el la revivigita "Revuo Orienta":

"Ĉe la tagiĝo de la paco, ni japanaj Esperantistoj havas plezuron sciigi al la eksterlandaj samideanoj, ke ni jam en la unua tago de la nova epoko estas pretaj, spirite kaj materie, por disvolvo de vigla movado por nia komuna entrepreno . . . La 16-an de Aŭgusto, la tagon post la japana kapitulaco, membroj de nia asocio esprimis sian firman konvinkon, ke ni japanaj Esperantistoj havas devon, kiel anoj de venkita nacio kaj samtempe kiel konsciaj membroj de la homaro, klopodi sindoneme por nia ideo, en la celo kontribui al starigo de konstanta mondpaco kaj al plialtigo de la kulturo kaj plivastigo de la bono de la homa raso.

"Nian novan elpaŝon faciligis la fortuno, ke nia oficeja domo restis tute sendifekta kun valora biblioteko kaj tuta stoko da eldonaĵoj. Ne nur unu fojon ĝi kvazaŭ pro providenco savis sin de pluvo da incendiaj bomboj kaj ciklonoj da fajro, kiuj formordis la plej grandan parton de la urbo; la konstruaĵo kun la emblemo de la verda stelo en sia frontono staras en

angulo de la senborda ruino de cindro kiel simbolo de la nova espero.

"Nia afero, malgraŭ sufokaj circonstancoj, neniam ripozis dum la milito. Nia monata organo aperis akurate ĝis Marto de la lasta jaro (1944), kiam la registaro "konsilis" al ni pere de la Japana Eldono-Societo ĉesigi ĝian eldonadon. La konsilon oni poste modifis pro nia klarigo pri la grava signifo de nia movado de la kultura vidpunkto. Tiam oni komunikis al ni la deziron, ke ni interrompu la eldonadon por unu jaro, ĉar la registaro opiniis, ke Esperanto-gazeto pro ĝia karaktero ne estas urĝe bezonata, kiam ĉiuj periodaĵoj devas esti mobilizataj por stimuli la popolon al batalemo kaj malamikemo. Ni sukcesis eldoni ampleksan studon de K. Ossaka, "Malgranda Monografo de Esperantaj Prepozicioj" (ĉ. 500 paĝoj) en la fino de 1943. Kursoj estis organizitaj konstante, ĝis fine la circonstancoj malebligis vesperajn kunvenojn. Liverado de eldonaĵoj ne haltis. Portante en dorsosako pakaĵojn da libroj menditaj de lokaj samideanoj, oni pasadis sur stratoj ankoraŭ fumantaj post nokta bombardo, serĉante poŝtofecejon en neincendiita zono. Ankaŭ novaj adeptoj, kvankam malmultaj, venadis al ni.

"Bedaŭrinde ni tamen perdis dum la milito plej konsiderindan nombron da membroj — unuj falis per kugloj aŭ pro miasmo sur la malproksimaj frontoj, aliaj perdiĝis per bomboj kaj fajro en siaj hejmurboj, dum ke aliaj defalis el nia vico pro diversaj motivoj. Kelkaj, precipe maljunaj veteranoj, ne ĝisvivis la malhonoran momenton de sia patrujo. Inter ili estis Profesoro D-ro Asajiro Oka, la unua japano, kiu lernis Esperanton. Li mortis 75jara, la 2-an de Majo 1944. Li estis iam Profesoro de la Pedagogia

Kolegio en Tokio kaj estis membro de la Imperia Akademio. Li estis vaste konata biologo. Li konatiĝis kun Esperanto en 1891, kiam li estis universitata studento en Leipzig. Du jarojn pli frue li mem faris projekton de internacia helplingvo, Zilengo (Nia Lingvo), kies strukturo tre similis Esperanton. Dum la tuta vivo li restis plej bona amiko de nia lingvo. Lia tuta familio, kvin gefiloj kaj bofilino, estas fidelaj adeptoj de Zamenhof.

"Kiam ni ekspedis la lastan numeron de nia organo, ni tenis ankaŭ mil membrojn. Sed nun, post la milito, la plej granda parto de iliaj adresoj estas perdita en la ruinoj, kaj ni apenaŭ sukcesis rehavi kontakton kun triono de inter ili. Ni tamen decidis daŭrigi la eldonon de tiu ĉi revuo. Ni retrovos iom post iom malnovajn amikojn kaj samtempe akiros novajn anojn, ĝis kiam tre baldaŭ ni havos tiom da membroj, kiom ni havis antaŭ la milito."

Ni ankaŭ eksciis kun granda inte-

reso, ke la Socialdemokrata Partio de Japanujo (Nippon Syakaito), kiu atingis duan lokon inter la partioj en la elektoj, metis la "enkondukon de Esperanto kiel internacia lingvo" en sian programon kiel paragrafo 11. En la inaŭgura kunveno de la partio, S-ro Ono Syuniti, ĝia centra komitatano, raportis, ke la partio "uzos Esperanton por kontakti kun la popoloj de la mondo." Alia japana organizo fondita post la fino de la milito, la Instituto por Paco Porĉiama, kies prezidanto estas Markizo Tokugawa, decidis uzi paralele Esperanton kaj la anglan lingvon por publikigi siajn raportojn eksterlanden. La Instituto jam organizis kurson de Esperanto por siaj oficistoj kaj membroj.

Ni deziras al la japanaj Esperantistoj plenan sukceson en ilia laboro, esperante, ke la interlingvo helpas ilin fari la reformojn necesajn por paca reconstruo de ilia lando kaj de la tuta mondo.

—*"La Revuo Orienta"*

ESPERANTO EKFLORAS EN GERMANLANDO

Depeŝo per *UP*, el Frankfurt, Germanujo, 7-an aprilo, informis: "Esperantistoj kunvenis ĉi tie hodiaŭ por apelacii al la aliancaj registaroj, ke ili enkonduku Esperanton en la lernejojn de Germanujo." Poste ni ricevis la plenan rezolucion pere de *James D. Sayers*, kiu partoprenis kaj helpis pri la tradukado. El Aŭstrujo venis simila raporto. *Prof. W. Cabell Greet* de Kolumbio-Universitato, kiu ĝin sendis al ni, skribis: "La nuntempo certe ne estas periodo en la historio de la mondo, dum kiam interesiĝo pri la internacia lingvo estu malhelata."

El Muenchen, Germanujo, alvenis raporto per *M. Lippert*: ". . . mi observas la Esperanto-movadon en la Usona Zono, kiu estas denove permezata depon 17 septembro 1945. Ĝi ekfloris kaj bonege kreskas." En Munkeno estas 15 kursoj kun 300 personoj, kaj la grupo "Laboro" havas pli ol 500 membrojn. La plej granda sukceso estas la enkonduko de Esperanto en la Universitaton de Munkeno. Ankaŭ la popol-alternejo kaj aliaj publikaj lernejoj akceptis Esperanton. *D-ro Ziegler* instruis la geinstruistojn per la nova tasko.

Ĉiu Membro de EANA aŭtomate fariĝas Asocio-Membro de IEL. Sed por ricevi la Jarlibron kaj gazeton de IEL oni devas aparte fariĝi Individua Membro de IEL. Ĉef-Delegito: D. E. Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles, Cal.

NIAJ MORTINTOJ

A. COUTO FERNANDES, estro de la Esperanto-movado en Brazilo, mortis pro kormalsano en la 22 de Aprilo. Tiu malfeliĉa novaĵo venis al ni de I. Gomes Braga. La morto de Inĝeniero Alberto Couto Fernandes persone kornuŝas nin. Inĝ. Couto Fernandes naskiĝis en S. Luiz do Maranhao, 23an de Oktobro 1871, esperantistiĝis en 1906, estis Prezidanto de B.L.E. de 1908 ĝis 1946, verkis la plej bonajn gramatikojn kaj vortarojn de Esperanto por la portugala lingvo, estis membro de la Lingva Komitato kaj Amerika Esperanto-Akademio.

El la adiaŭaj vortoj de S-ro Braga, ĉe la entombigo de A. Couto Fernandes, ni elprenas signifan frazon: "Se la Esperanto-movado en nia Patrolando estas nun fervora kaj respektinda idealo, kiun ĉiu serioza homo ŝatas kaj atentis, tion ni ŝuldas al via pacienca penado." Granda verda standardo envolvis la ĉerkon, kaj S-ano Couto Fernandes estis entombigita en la Verda Standardo, kiun li tre amis.

ROGER GOODLAND, kies morto estis raportita en AE, Sep-Okt 1945, provizis monsumon por EANA, en sia testamento. Jos. Leahy, antaŭa sekretario kiu persone konis S-ron Goodland, ricevis ĝin por EANA. Kia grandanima Esperantisto estis Roger Goodland! Dum la vivo li konstante propagandis por Esperanto, kaj je morto lasis al organizoj monsumojn por daŭrigi la servadon. Ni devas meriti lian fidon.

PASTRO F. X. O'RIORDAN, katolika pastro kaj fervora nova Esperantisto, mortis en la 13a de Junio, 1945. Li loĝis en Birmingham, Mich. Li mirinde lernis Esperanton dum nur kelkaj semajnoj. Okazis longa silento. Serĉante la kaŭzon, ni ĵus lernis pri la morto.

WILLIAM H. DONALDSON, longtempa kaj lojala Esperantisto, membro de EANA, mortis je la 7-a de Februaro. Li loĝis en Nov-Jorko, kie li ĉiam sekvis kaj subtenis la progreson de Esperanto. Al lia edzino, kiu sendis informon pri la morto, ni esprimas kondolencon.

D-RO WM. S. BENSON, kies morto ni raportis en Nov-Dec AE, meritas gravan lokon en la historio de Esperanto. Tra la tuta mondo, oni ĝuis profite lernadon de Esperanto per lia granda *Universala Esperanto-Metodo*. Je la fina horo de lia morto, li troviĝis verkante novan libron similan — kiu nun neniam estos presita, ĉar nur la majstroŭso de D-ro Benson mem povus finverki ĝin.

D-ro Benson estis Esperantisto de post la du unuaj jaroj de la naskiĝo de Esperanto. Li lernis ĝin en Pollando. Dum li estis ankoraŭ juna li migris al Usono, kie li fariĝis kuracisto. En lia fako de kuracado, li elpensis diversajn sciencajn kuracilojn. Li starigis Esperanto-lernejon, kie li kondukis korespond-kursojn. Li estis grava kunredaktisto de la gazeto *Esperanto Junularo*. La Bensonna Lernejo de Esperanto ne plu ekzistas, sed lia amata filino, *Flora Benson*, ankoraŭ prizorgas la diversajn librojn.

Estinte treege modesta homo, D-ro Benson neniam ricevis la laŭdon kiun li meritis. Ni esperas ke iam la Esperanto-historiisto elserĉos la tutan interesan rakonton pri lia vivo kaj laboro. Dumtempe restas nur libroj — multaj, diversaj, bonhumoraj, multilustritaj libroj. Kaj vera monumento al D-ro Benson estas lia grandioza verko, Bensonna Esperanto-Metodo, 500 paĝoj, 10,145 bildoj, 40 lingvoj, 200 verketoj, kaj plena tutesperanta ilustrita vortaro. Ni honoru lian laboregon. Ni funebru la perdon de dumvive lojala pioniro de la interlingvo Esperanto.

ONE MORE \$100, AND . . .

. . . we will have won the \$100 which Mrs. Flora Wyman offered to the \$1000 *Working Fund*, on condition that five others would give \$100 each. Four have already contributed \$100 — James H. Furay, *Anonymous*, *Esperanto Club of Washington, D.C.*, and Hal Ewen. Hal wrote: "I cannot be content until I am sure every effort has been made to provide AE with adequate reserve. So . . . I have already contributed \$25 — I pledge to contribute \$20 per month for the next four months to make a total of \$100, and to help meet the quota of five contributors at \$100 each. This is straining my resources more than I ought, but I consider it a worthwhile strain . . ." Hal wants *Esperanto in America* — NOW, and all who know his circumstances, know that he is making a tremendous personal financial sacrifice for Esperanto.

Samideanoj like Hal Ewen, and a growing list of others (with the same idea of adequate support for *Esperanto in America*), brighten and lighten our labors at the Central Office. Our own sacrifices — foregoing *one* \$2500 a year salary, and foregoing *all* nights, weekends and holidays, to build an enduring Esperanto fortress for Esperanto — become joys in the light and warmth of such support. Who will respond with the needed \$100? *One more* \$100, and . . . we will have reached the sum of \$961. *Two more* \$100's, and we will be dollars beyond the \$1000 which we set as our goal. We are positive that this need be our final appeal for the \$1000 Fund, and that not only \$100, but many sums of \$25, \$10, and \$5, will be contributed to assure the success of this effort. Complete list of all contributions in later AE.

ANONCO — ESPERANTISTOJ DE KANADO

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko anoncas novan Kunredaktiston por Kanado, en la Stabo de *Amerika Esperantisto*. Li estas Kapitano el la Kanada Armeo, nome *Captain William M. Doran*, 595 *Pall Mall Street, London, Ontario, Canada*. Kapitano Doran flue parolas france, angle, kaj Esperante. Li respondas pri io ajn, kio koncernas la Interlingvon. Sendu al li novaĵon por AE. Kunlaboru kun li por varbi grandan nombron da Kanadanoj en la kumunan klopodon por efika Nord-Amerika movado.

Provincial Institute of Technology, Calgary, Alberta, havas grupon da studentoj kiuj deziras studi Esperanton. *G. Ewart Brown*, de la Instituto, jam komencis organizi ilin.

Franc-Kanadano, Joseph E. Girard, nun civitano de Usono logante en Nov-Jorko, multe helpas en la laboro ĉe la Centra Oficejo. Lia familio devenis de Kebeko.

R. kaj M. Kelly, Ŝeridano, Ontario, sendas gratulon al Prezidanto Robert Karlson, pro lia estrado de la Nord-Amerika movado el Kanado.

S-ro H. M. Raynor, Ituna, Sask., Canada, deziras korespondi tutmonde. Li estas nova fervora ano de EANA. Skribu multnombre.

Andrew O'Reilly, Toronto, Kanado, sendas gratulon al AE, pro la plibonigo de la enhavo. Li raportas novan stud-rondon en Toronto.

R. A. Flavell, Oyama, B.C., sendas novajn abonajn kaj aliĝojn al EANA. Li sendis abonon por samideano en Francujo ankaŭ.

J. H. Hartley, sendis tutan aron da abonoj kaj membrecoj el *Hamilton, Ontario*. Hamiltono montras bonan kreskigon en Esperanto.

Toronto-Esperanto-Klubo raportas novajn sukcesojn pri membroj kaj diversaj leteroj pri Esperanto en la lokaj ĵurnaloj. Ni gratulas.

THE ESPERANTO STUDENT

Here are some expressions which you will find useful when going on an excursion in Esperanto land. Notice the formation of the word *vid-ind-ajoj* (things worth seeing, the sights). Learn especially the use of *interesiĝas pri* (is interested in), and when we speak of traveling by bus, tram or other vehicle the word *veturi* is the word to use.

La Ekskurso

Bonan tagon, fraŭlino! Ĉu vi estas preta por la ekskurso?

Jes, sinjoro. Mi tre ĝojas pri la ekskurso. Kien ni iros?

Estas multaj belaj vidindaĵoj en nia urbo. Ekzemple, la nacia muzeo, la malnova palaco de la reĝo . . . Ĉu tio interesas vin?

Mi tre interesiĝas pri historiaj lokoj. Ĉu ni veturos per tramo aŭ per aŭtobuso?

Unue per aŭtobuso, poste per tramo, kaj fine, bedaŭrinde, per niaj propraj piedoj!

Ho, ne gravas! Mi ŝatas la marŝadon.

Bone, fraŭlino. Mi proponas, ke poste ni veturu al la bela kamparo, kie ni povas multe promeni.

Tre bone, sed en tiu okazo mi devos kunporti mantelon, ĉu ne?

Jes, ĉar vespere estos sufiĉe malvarme . . . Kaj fine, fraŭlino, ni vizitos la Esperanto-klubon. Tie oni povas kanti, danci, manĝi aŭ nur babili. Ĉu vi ŝatas danci?

Ho, jes, sinjoro . . . mi tre ŝatas danci.

Nu . . . en Eŭropo ankaŭ, la ĝejnuloj ŝatas danci kaj aŭskulti al tiu swing-muziko de Usono.

Tre interese! Mi vidas, ke muziko ankaŭ parolas internacian lingvon!

The Excursion

Good day, Miss! Are you ready for the excursion?

Yes, Sir. I am very happy about the excursion. Where are we going?

There are many beautiful sights in our city. For example, the national museum, the old palace of the King . . . Does that interest you?

I am much interested in historical places. Do we travel by tram or by autobus?

Firstly by bus, afterwards by tram, and finally, unfortunately, by our own feet!

Oh, that does not matter! I like walking.

That's fine, Miss. I suggest that later we go out to the beautiful countryside, where we can walk a lot.

Very well, but in that case I will have to take a coat along, won't I?

Yes, because in the evening it is quite cold . . . And finally, Miss, we shall visit the Esperanto club. There one can sing, dance, eat or just talk. Do you like to dance?

Oh, yes, Sir, I like to dance very much.

Well . . . in Europe also, the young people like to dance and listen to that swing-music of the U.S.

Very interesting! I see that music also speaks an international language!

Proposed Amendment to the Constitution

Section 2, Article VI: "The annual dues for full, active membership in the Association will be at the rate of \$5.00. Associate, subscribing membership (non-voting) will be retained at the annual rate of \$2.00. All members of EANA shall be entitled to all rights and privileges of the Association, including the receipt of its official organ, except that only active members will have the right to vote, and eligibility to the elective and appointive offices of the Association."

ARGUMENTO POR MIA SPEGULO

RAYMOND SCHWARTZ

Responde al nia aŭdaca peto, *Raymond Schwartz* bonkore skribis: "Mi volonte aldonas ĉi kune poemon, ankoraŭ nepublikigitan, esperante, ke ĝi plaĉos al la legantoj de *American Esperantist* (pri kies bonega prezento kaj tre interesa enhavo mi tre varme gratulas vin!)"

Mi fariĝis kvindekjara,
bela aĝo por junulo!
Por junulo kvindek ... hara,
kiel mokas la spegulo ...

Sed spegulatestoj pravas
nur laŭ fuĝa perspektivo
kaj malofte ili havas
stampon de l'definitivo.

Kvindekjara-kvindekhara,
hodiaŭa ekvilibro
estos jam bilanc' erara
en morgaŭa kontolibro!

Sed pro kio mi rezonas
pri similaj bagateloj
kun spegulo, kiu konas
nur la lingvon de l'marteloj?

Se vi volas argumenton,
ĝin mi tiel ĉi formulas:
"Ofte neĝas sur tegmenton
dum interne fajro brulas!"

Sekve sciu, mia knabo,
ke mi havas ĝis nunhoro
kvindek jarojn sur la kapo,
sed ... nur dudek en la koro!

"Ĉu estas eble, ke ni envenu . . . ?"

Lowicka 39a, (Mokotow), Warsaw

Estimata samideano,

Koran dankon pro via letero. Estas granda konsolo por ni, ke la samideanoj el la vasta mondo pensas pri ni. Sendube vi scias, ke mia edzo estis en la komenco de la milito malliberigita kaj elveturigita en nekonata direkto; ĝis nun mi ne havas sciigon de li, sed mi ne ĉesas esperi, ke li revenos. El tuta familio mi restas nur kun mia filo Ludoviko kaj unu sola fratino. Nia vivo estas malfacila, ĉar la milito fakte ruinigis nin. Mi laboras en mia fako kiel kuracisto-optalmologo (okul-malsanoj). Ludoviko studas duan jaron en la politeknikejo (konstrufako). Ni ĉiam ankoraŭ estas sub la impreso de la kruelaj travivaĵoj, kaj tiuj teruraj rememoroj paralizas nin je ĉiu paŝo. Vi skribis, ke vi intencas helpi nin. Ĉu estas eble, ke ni envenu en vian landon, ke mia filo povu kontinui pri siaj studoj, ke mi povu trovi laboron? Atendante senpacience vian respondon, mi sendas al vi kaj al ĉiuj amerikanaj samideanoj plej bonajn bondezirojn.

WANDA ZAMENHOF (Adresu: *Dr. Wanda Zaleska*)

Tiu letero estis sendita al J. H. Holding, Chicago. Kune kun Dr. Stefan Zamenhof, nun loĝanta en Nov-Jorko, *Amerika Esperantisto* klopodas trovi helpon pri la envenigo en Usonon de Wanda kaj Ludoviko. Ĉu ne estas samideanoj kiuj aŭ povas plenumi dokumenton ('affidavit') aŭ povas donaci monon por faciligi la envenigon?

ESPERANTO VIVAS

Radio-anoncisto kaj aktoro en la Usona Armea Radio-stacio en Frankfurt, Germanujo, estas la nuna posteno de Soldato D. B. Richardson. Li partoprenis diversfoje en kunvenoj de la nove starigita Esperanto-Societo tie.

★

El letero de Ĉinujo ni elĉerpas: "Nun en nia lando pli kaj pli vigliĝas nia Esperanto-movado . . . Antaŭ la novjaro, je la 15-a de Decembro ni okazigis Esperanto-ekspozicion rememore al nia Majstro. La rezulto ankoraŭ estas bona: pli ol kvin mil personoj ĝin vizitis, kaj pli ol cent el ili — juna kaj maljuna — plenskribis niajn aliĝilojn por element-kursanoj." Tiun informon sendis S-ro Laŭlum de la Ĉengrua Esperanto-Ligo pere de S-ro Wang, kiu estis dum iom da tempo en Usono, sed kiu jam revenis al Ĉinujo.

★

Esperanto en la Statodomo de Okcidenta Virginio estas la rezulto de konstanta klopodo de Roland W. Ruff. Diversaj el la personaro nun studas Esperanton, kaj baldaŭ la Informejo de la Stato eldonos novan Esperanto-broŝuron pri la historio kaj geografio de la Stato.

★

Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, la nova internacia ligo kiu laboras per Esperanto por mond-federacio, raportas kreskantan nombron de novaj anoj. Skribu al la adreso por plena informo. Estas grava klopodo por Esperanto, pri kio ĉiu Esperantisto devas informiĝi. Andreo Ĉe, Edmond Privat, Julia Isbruecker, kaj aliaj mondkonataj Esperantistoj estras la aferon.

★

Etty Graeffe, Fargo, Nord-Dakoto, tre lerte kaj konstante laboras por nia afero. Inter aliaj klopodoj estis granda demonstracio por Esperanto en la "Camp Fire Girls Grand Council Fire" en Fargo.

Kaare Myhr, Norvega Radio-Oficiro dum la milito, estas tre klera Esperantisto, kiu ĵus revenis al la kara patrolando post longaj militaj jaroj. Dum resto en Nov-Jorko, S-ro Myhr tre bonkore laboregis pri diversaj oficej-laboroj en la Centra Oficejo. Niaj bondeziroj iras kune kun S-ro Myhr al Norvegaj samideanoj. Kaj al S-ro Myhr mem, ni deziras longemeritan feliĉon hejme el la milito: "Norge, ho donu printempon por foj' kun suno sur onda rivero."

★

*Jose Serrano, Meksikurbo, Meksiko, estas agema Esperantisto en nia najbara lando. Li sendis al ni grandan eltranĉaĵon el *Universal* (grava tag-jurnalo de Meksiko), en kiu estis presita artikolo kun bildoj pri Esperanto por UNO. S-ano Serrano forte subtenas la interligon de Esperantistoj en Kanado, Usono kaj Meksiko, por komuna agado. Li aldonis la devizon: "La frateco estas la komenco de la paco!" Ni atendas pli de lia plumo en estontaj numeroj de AE.*

★

Esperanto-klasoj adoptas familiojn en Eŭropo. Junuloj en la klasoj de James A. Clarkson, Hopkins, S.C., kaj Pastro Enrico C. S. Molnar, Berkeley, Kalifornio, sendas regule pakajojn al Esperantistaj familioj kiujn ili adoptis. Ĉu aliaj grupoj ne deziras fari la samon?

★

Komitato por UNO-Kampanjo, Glenn P. Turner, Direktoro, P.O. Box 1, Madison 1, Wis., raportas provizore ke ĝi ricevis pli ol 2,500 subskribojn al la deklarioj pri Esperanto por UNO. La nombro kreskas tage, kaj en sekvonta numero de AE ni presos plenan raporton de S-ro Turner. Tiu granda laboro meritas la subtenon de ĉiu membro de EANA. Preskaŭ 50 membroj jam sendis kontribuajojn al Direktoro Turner por helpi pri la elspezoj. Ni anticipas plenan raporton aŭtune.

ESPERANTO KRESKAS

Esperanta Interlingva Asocio, 27 Aprilo, en Hotelo Nov-Jorkano, havis literaturan vesperon. S-ro George E. Hatvary parolis pri temo "In Memoriam, Karinthy." S-ro Nicholas Torzs kantis hungare, angle, kaj esperante. Estis entute vera hungara literaturo-vespero.

★

Nova Esperanto-Grupo estas organizita en Portsmouth, N.H., post tre sukcesa klaso de F-ino Roan Orloff. S-ro Woodbury Burd, de Kittery Point, Maine, gvidas la grupon en la Esperanto-agado.

★

Prof. Edwin L. Clarke, Ekzamena Komitato, raportas la jenajn gajnintojn de Atestoj: *Mabel Rankin Vicary*, Detroit, Mich., Atesto pri Lernado; *David M. Earl*, Detroit, Mich., Atesto pri Instruado. Ni kore gratulas la gajnintojn.

★

Isabel P. Snelgrove, Grand Forks, N. Dak., sendas AE-abonojn por du bibliotekoj, kaj faras tre taŭgan proponon rilate al la efika uzo de *Amerika Esperantisto*. Ŝi proponas, ke ĉiu membro abonu al du tri krom-ekzempleroj de *AE* por propagandaj kaj varbadaj celoj. Kiu sekvos ŝin per tia plano? Kiu sendos al ni leterojn de subteno pri la ideo, por ebla presado en *AE* — por ke ni komencu abon-kampanjon?

★

Internacia Filatelisto estas la nomo de nova, bone redaktita, mimiografita gazeto eldonita en Usono. La unua numero estis Junio, 1946. Filatelemaĵoj samideanoj, turnu vin al la redaktisto *J. H. Holding*, 2647 Adams St., Chicago, Illinois.

★

Nicola Kaparashoff, 838 N. Mariposa Ave., Hollywood 27, Cal., bulgara s-ano, deziras sendi uzitajn vestaĵojn kaj ŝuojn al siaj familianoj en lia malfeliĉa patrolando. Se eble, bonvolu sendi uzitaĵojn al li.

Kandidato por la Prezidenteco de Usono el la ŝtato Michigan en 1924 estas nun bona laboranto por Esperanto. Li estas Wm. G. Simpson, kiu nun loĝas en Schenectady, N.Y.

★

Pastro Preston Bradley, "Preĝejo de la Popolo en Ĉikago, faris radio-paroladon (WGN Ĉikago, 8-an Aprilo) pri Esperanto. Li bazis la paroladon je tiu mirinda artikolo de *Frank L. Gaines*, en *NUGGETS*. Responde al promeso de Pastro Bradley pri pli da informo pri Esperanto, preskaŭ 300 skribis al li — kaj li sendis ilin al la Centra Oficejo. Diversaj estas nun novaj anoj de EANA.

★

Nova Esperanto-Klaso por skoltoj nun funkcias regule sub la gvidado de H. Elwin Reed en Los Angeles. 15 skoltoj studas.

★

William A. Knox, Cirklo-Pinoj-Centro de Kooperado, Cloverdale, Mich., starigas Esperanto-klasojn por lernantoj kaj somer-loĝantoj.

★

Lee Nel-son, ĉina Esperantisto, kiu nun deĵoras en la Oficejo pri Vetero, Denver, vizitis la Centran Oficejon antaŭ nelonge. Li informis nin, ke la Esperanto-Ligo en Ĉunkino daŭre provizas Korespondan Kurson eĉ dum la militaj jaroj. Jam pli ol 2000 lernantoj registris sin. Ili eldonis ankaŭ novan libron en la ĉina lingvo kun la titolo "Biografio de D-ro Zamenhof."

★

Entuziasma grupo de pli ol 16 lernantoj de Esperanto kunvenas lunde vespere en la Publika Biblioteko en Long Beach, Kal. Charles H. Briggs, fervora samideano de multaj jaroj gvidas la grupon. Multaj el la membroj jam aliĝis al EANA.

★

Marion S. Alderton, Palo Alto, Kal., sendis proponon por U.N.-standardo, kiu konsistas el verda flago kun la vortoj: "Paco Inter Nacioj."

ESPERANTO FLORAS

Pastro J. B. Kao. O.F.M., la eminenta ĉina Esperantisto, enŝipiĝis en San Francisco la 12an de Aprilo, unu tagon post lia 40a naskotago, en usona truptransportilo, "General Breckenridge," iranta al Shanghai. Pastro Kao reiras hejmen post 16jara foresto en Eŭropo, Usono, Suda kaj Centra Ameriko. Ĉie li sukcese laboris por Esperanto.

★

La Brazilia Poŝta Administracio, eldoninte belan serion de poŝtmarkoj sub la titolo "Serio de la Venko," dissendis specialan folion enhavantan faksimilon de la poŝtmarkoj kaj klarigan tekston en portugala, angla, franca, itala, hispana, ĉina, rusa kaj Esperanta lingvoj. La Esperanto-tradukon faris la Prezidanto de la Brazilia Ligo Esperantista, S-ro A. Couto Fernandes. La ĉinan tradukon faris famkonata ĉina Esperantisto, Pastro J. B. Kao.

★

La Eduka Direktoro de grava laborista sindikato ILGWU (International Ladies Garment Workers Union, Internacia Unuiĝo de Laboristoj pri Virinvestoj), S-ro Mark Starr, estis la unua parolanto en demonstracia kunveno pri Esperanto, kiu okazis 20an de Majo en la Kunveno de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) je la 20-a Strato en New York. La redaktisto de AE, G. Alan Connor, faris la ĉefparoladon pri Esperanto, Doris T. Connor donis ĉe-metodan demonstracion. Efikan ekspozicion organizis S-ro Donald Stephens.

★

Generalo Julio Mangada, fama hispana pioniro de Esperanto, mortis 14-an de aprilo, en Meksiko. La novaĵo ĵus alvenis de Francisco Azorin, pere de S-ano Floreal Conchado. Spaco mankas en ĉi tiu numero por doni taŭgan nekrologon pri Generalo Mangada, sed ni intencas presi artikolon en estonta numero de AE.

D-ro Frederik Jozef Belinfante, de Leiden, Holando, venos al Nov-Jorko en Julio, survoje al nova hejmo en Vancouver, B.C., kie lie instruos en kolegio.

★

Kiu estas Kiu. eldonita de F. A. Post, "Espero." Route 5, Little Rock, Arkansas, estos plibonigita kaj represita, laŭ informo de Kapitano Post. Li bonvenas sugestojn, indajn adresojn, demandojn, ktp, por la nova eldono. Samletere venis novaĵo pri vigla propagando por Esperanto per *Little Rock Esperanto Rondo*. Lastatempe ili aranĝis publikan kunvenon kun la temo *Esperanto kaj UNO*.

★

Esperanto-Societo de Nov-Jorko, kondukis bonan kunvenon en Hotelo Nov-Jorkano, 4-an Majo, kaj elektis novan prezidanton, S-ro John L. Lewine. Raportita de la nova sekretario, S-ino Laura S. Lomo.

★

Prof. Dott. Giorgio Canuto, Universitato de Parmo, Italio, skribis al Lehman Wendell: "Mi kaptas la okazon sciigi al vi kiel samideano, ke post la liberigo, la esperanta afero ŝajnas multe revigliĝi ĉe ni. Multaj grupoj estas fonditaj en diversaj urboj, kaj ĉie oni faras prelegojn pri Esperanto, kaj oni komencis kursojn. En mia urbo mi faris prelegon ĉe la universitato, kun ĉeesto de multaj profesoroj kaj studentoj, kaj baldaŭ mi komencos Esperanto-kurson en mia Instituto por kuracistoj."

★

"Our Times." 400 South Front St., Columbus 15, Ohio, estas semajna ĵurnalo kiu publikigas la novaĵojn por lernantoj en la lernejoj de la tutlando. En la numero, 27-31 Majo 1946, troviĝas granda artikolo pri Esperanto, de S-ano Preston Davis.

★

Elwyn C. Pollock informas nin, ke la libro-servo kiun li estras, *Esperanto-Libro-Servo de Usono*, havas novan adreson: *Fallbrook, Cal.*

DEZIRAS KORESPONDI

Usono. S-ro Iver Svarstad, Villa Annex, 800' E. Ocean, Long Beach, Calif. Dez. kor.

Usono. S-ro Howard E. Latham, Box 75, Caledonia, N.Y. Dez. kor.

Usono. S-ino Melvin Helmer, 1337 3rd Ave. N., Fargo, N. Dak. Naskiĝis en Norvegujo, nun Usonanino, dez. kor. kun la tuta mondo.

Cekoslovakio. Otto Melich, Stefanikova 51, Zilina, Juna Esp. skolto, dez. kor. kaj interŝ. PM.

Siamo. Adriaan Smits, Eur. Brig. 95504, Nakorn Patom. 25-jara soldato en Nederlanda Hinduja Armeo, eksmilitkaptito de la Japanoj, dez. kor. Skribu aerpoŝte.

Svedujo. S-ro Paul Isacsson, Fridhem, Algaras, filatelisto, dez. interŝ. PM, il PK, gazetojn.

Svedujo. S-ro Arvid Pettersson, Karlslundsgatan 6, Skovde. Dez. kor., interŝ. PM, kor. pri amatorbotaniko kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Nederlando. S-ro Dirk van Ryn, Spaarnwouderweg 843, Vyffhuizen, dez. kor. kun Usonanoj.

Danujo. Per Hansen, 20 Resedavej, Gentofte. 15-jara skolto dez. kor. kun skoltoj kaj interŝ. PM.

Ĉinujo. S-ro Fu Sien-Pei, Chengtu Poŝtoficejo, Szechwan, Poŝtoficisto dez. kor. kun geesperantistoj en Usono kaj interŝ. spertojn pri rusa, angla kaj ĉina lingvoj.

Cekoslovakio. F-ino Vera Tlapakova, Praha VII, Tusarova 36. 20-jara, serĉas simpatiajn korespondantojn.

Franujo. Marcel Lenoble, 52 Ave. Edouard Vaillant, Pre Saint-Gervais, Seine. Dez. kor. kun Usona teknisto, desegnisto, en mekanika industrio.

Nederlando. S-ro J. Hubregtse 24j; 123 v. Goghstraat, Den Haag. Dez. kor. kun geusonanoj, precipe pri transŝanĝiĝo de elementoj.

Cekoslovakio. S-ro Ptaček, Kostelni 802, Praha-XIV-Michle. Farmacia studento en Karlova Universitato dez. kor. kun amerikanoj.

Nederlando. Katolika Esperanto-Unuiĝo en Hago, Sekr. K. J. Ver-nooij, Vlierboomstraat 234, Den Haag, okazigos sian unuan postmilitan letervesperon en Septembro 1946, petas leterojn, poŝtkartojn ktp. el ĉiuj mondpartoj. Certe respondos.

Rumanujo. F-ino Gigi Harabagiu, privata oficistino, Str. Ahena 1, Bucuresti.

Islando. S-ro D. S. Magnusson, Bergsfadastraeti 30-B, Reykjavik.

Jugoslavujo. S-ro Ljudevit Negovetiĉ, Kralja Tvrtka ul. br. 1, -IV, Sarajevo.

Finlando. S-ro Viljo Punni, Stora Langgat 60, Vasa, 28-jara.

Islando. S-ro Borge Lemming, Laugaraŝi, Biskupstunga, interŝ. PM.

Hispanujo. S-ro J. M. Ventura Cortes, Arrabal de S. Antonio 124, Valls, Tarragona.

Polujo. S-ro Isaj Dratwer, Szeroka 5, Warszawa-Praga, kor.

Egiptujo. S-ro Muris Metri, c/o P.K. 450, Cairo, interŝ. P.M.

Finlando. Vaino Makila, Laihasmaki 14, Turku 9. Dez. interŝ. il PK aŭ leterojn.

Ĉinujo. S-ro Hianĉun S, No. 45 Zheng Strato, Slo, Kuangsi. Nova Esperantisto dez. kor. Tre dez. Gregg kaj Pitman Shorthand librojn.

Nederlando. Nekatolikoj dezirantaj informojn pri la dogmoj kaj praktikoj de la katolika Eklezio povas ricevi ilin senpage de la Sekretario de *Internacia Katolika Informejo, Fr. M. Monulfus, Loonopzand, Nederlando.*

Franujo. Bernard Robert, 9 Blvd. Voltaire, Dijon (Côte-d'Or), dez. usona kor. por si mem (20-j. katolika seminariano) kaj por amiko 19-j.

Angolo (Afriko Portugala). Aŭgusto Pedroso das Neves, fraŭlo, 25-j, kontoristo de Kompanio de Diamantoj de Angolo, Dundo, Angolo.

Aŭstrujo. Gesamideanoj dez. kor. kun usonanoj; skribu per Franz Foettinger, Kaserngasse 7, Salzburg.

ESPERANTO BOOKS

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp. (war-time edition)25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition)75c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. Paper, .80c; Cloth, \$1.25	
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. S. Benson. Unique picture-method with 650 illustrations, English text, and Vocabulary. 80 pp.25c
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO, Dr. Wm. S. Benson. "The only book of its kind in the world". 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and tables of correlatives in 36 languages. Direct picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary (fully illustrated with common words given in 40 languages), and index. A unique and encyclopedic book. 560 pp. cloth bound, stamped in gold	\$4.00
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. cloth	\$5.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. . . .10c; 3 for .20c; 10 for .50c	
10-IN-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pp. Paper .50c; Cloth	\$1.50
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict. . .	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition)30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
KARLO, Edmond Privat. Easy first-reader in Esperanto. 44 pp.30c
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp.15c, 10 for \$1.00
ESPERANTO-SORTIMENTO: <i>Ginevra</i> , Privat; <i>Princo Vanc'</i> , Putnam-Bates; <i>Blanche</i> , Payson; <i>Miserere kaj Thats</i> , Payson; <i>La Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson; <i>La Akrobato de Nia Sinjorino</i> , Payson. Good Esperanto reading at bargain prices to reduce stocks25c each; all 6 for \$1.00
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp.75c
LA SANKTA BIBLIO en Esperanto. Complete old and new testaments	\$2.00
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper	\$1.00
JUNECO KAJ AMO (Legendo el Venecio), Edw. S. Payson. Cloth	.50c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center65c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

U. S. Military Academy, West Point.

I chanced upon the American Esperantist magazine while browsing in the Post library. At first the cause of Esperanto interested me only as a student of languages. However, as I perused further, my interest became that of a man who, like most men, wishes for peace in which to rear his children, and despises war as a professional soldier who studies the disgusting business of destruction.

The nations of this globe are now being held together — and not without friction — by a large and imposing new chain, the U.N. But — some of the links in this impressive chain were forged of weak material — suspicion, fear, and revenge. These links must and will, I believe, be repaired.

Then too, there are a number of small but sinewy threads helping to bind the fretting nations together. Such are the International Red Cross, the Catholic Church, Protestant Churches, the Boy Scouts of the World, lodges, artisans' organizations, and others. These unimposing bonds are able to withstand many of the stresses put upon them by the writhing world because they are woven of permanent stuff — compassion for fellow mortals, religion, love of arts or literature, love of life.

I believe that Esperanto fits this classification. It is one of those small ties between nations which must help to hold them together while the weak links in the greater bond, the U.N., are being reinforced. Based on a desire to understand and converse with all men on an equal plane, it is a strong bond. I hope it can be further strengthened by vigorous and intelligent promotion. — DANIEL O. GRAHAM (Cadet, United States Military Academy).